Numero unua. Sabaton 6-an de aŭgusto

# Kongresa Sciulo

Kongresa Kuriero de la 107-a Universala Kongreso de Esperanto

## Reveno al Kanado post 40 jaroj



Post Laĥtio en 2019, ni spertis neeviteblan paŭzon en la ritmo de la ĉeestaj Universalaj Kongresoj de UEA. Tamen fine venis la vico de la kanadaj esperantistoj, la sopirata UK, planita jam de multaj jaroj kun paŭzego de preskaŭ 40 jaroj, post la Vankuvera Kongreso kiun mi ĉeestis kun almenaŭ kelkaj el vi. Interesa koincido kaj evoluo de Kongresaj temoj. En 1984, la ĉefa fokuso estis *Lingvaj minoritatoj: ĉu nur nacia fenomeno?* Kaj nun ni eniris la jardekon de indiĝenaj lingvoj proklamitan de Unuiĝintaj Nacioj kaj Unesko, kies celo efektive inkluzivas la agnoskon de ĉiuj lingvaj minoritatoj. La fokuso en nia ĉi-semajna UK intence subtenas la progreson en la monda konscio pri la graveco de indiĝenaj kaj minoritataj lingvoj kaj kulturoj, kaj la danĝeroj al la diverseco de perspektivoj kiun reprezentas ilia neglekto aŭ eĉ malapero..

En oktobro de 2019, kiel nova prezidanto de UEA mi pasigis preskaŭ semajnon en Montrealo kun la LKK dum vizito de nia tiama Konstanta Kongresa Sekretario (KKS), Clay Magalhães. Lia ĵusa forlaso de tiu posteno aparte memorigas min ke li alportis tiuokaze sian multjaran sperton pri la organizado de la fenomeno de Universalaj Kongresoj, kuraĝigante la novan LKK kaj ĝojante pri ilia iniciatemo kaj laboremo. Kvankam 2020 ne povis esti la jaro de efektiviĝo, 2022 jes!

En nia nuna mondo, granda nombro da konferencoj kaj kongresoj fariĝis virtualaj aŭ hibridaj pro la evoluo de reta videa teknologio. Tamen restas la deziro de interhoma kontakto, kiu ekde la mejloŝtona renkontiĝo de parolantoj de la lingvo en 1905, en Bulonjo-ĉe-Maro, donis grandan impeton al la lernado de lingvo kiu permesas transsalti nacilingvajn barojn. Por kio? Interalie por komunikiĝi egalbaze kun homoj plej diversoriginaj pri niaj interesoj kaj la bezonoj de nia mondo. La defioj kiujn ni frontas ne estas novaj, kvankam ni povas senti ke ili estas en nia epoko minace severaj por kiuj deziras vivi en paco en daŭripova mondo.

Do sojle de nova strategia planado de UEA mem, ni deziras ke vi profitu la okazon por dividi kun ni viajn ideojn, pensojn, konvinkojn pri la estonteco de nia movado, kaj ĝia kontribuo al pli interkomprenema kaj paca mondo. Pandemio estas evidente malagrabla defio por la homaro, tamen en la historio montriĝis fenomeno studita jam en unu el niaj virtualaj renkontiĝoj pri *pozitivaj efikoj de la pandemio:* pli da kreemo kaj inventemo por solvi mondajn problemojn; plispertiĝo pri la uzado de teknologio por kunigi kaj partoprenigi individuojn kiuj restis ekster niaj aktivaj rondoj pro nekapablo vojaĝi; konscio ke tio kio nun unuigas povas esti pli forta ol la elementoj kiuj nin dividas. Kaj tio malgraŭ la fakto ke decidoj de registaroj reliefigis nian homan respondecon resti pli komprenemaj ol kondamnemaj; pli elmontremaj de bonkoreco al suferantoj kaj al niaj kunhomoj ĝenerale; pli konsciaj ke por havi pacan mondon necesos ke la popoloj kuniĝu preme al konfliktosolvado por malakceptigi la ideon de perfortado kaj detruado kiel necesaj por solvado de kolizioj de interesoj inter la popoloj kaj iliaj registaroj.

Ĉu UEA meritas brilan novan rolon en nia mondo? Se jes, ĝia kerno vidiĝu dum ĉi tiu semajno en multkultura Montrealo, montrante ke ni povas kunpensi, kune plikleriĝi, kunestimi niajn kunulojn, kaj ne forgesi ĝui nian kunestadon en bela esplorinda nova loko... en nia ŝajne senlime konfliktema mondo, ni ne neglektu kial ni lernis Esperanton kaj kion nia praktika uzo de la lingvo povas signifi por niaj terglobaj najbaroj!

**Duncan Charters**, prezidanto de UEA

# Kelkaj utilaj esprimoj

Tamen sciu, ke preskaŭ ĉiuj tuj angle alparolos eksterlandanon…
Kaj vi trovos surstrate plurajn homojn, kiuj ne scipovos la francan…

| | |
|---|---|
| Bonan matenon, tagon | bonjour (bonĵUr) |
| Bonan vesperon | bonsoir (bonsŭAr) |
| Bonvolu | S'il vous plait (silvuplE) |
| Bonvolu (por veki atenton) | Pardon (pardOn) |
| Kie troviĝas la metroo? | Où se trouve le métro? (ustrUv lemetrO) |
| Kiel mi povas iri al UQAM (la kongresejo)? | Comment puis-je me rendre à l'UQAM? (komAn pŭiĵmerAndr alukAm) |
| Glason da akvo, mi petas. | Un verre d'eau, s'il vous plait (unverdO, silvuplE) |
| Glason da biero, mi petas. | Un verre de bière, s'il vous plait (unverdebjEr, silvuplE) |
| Ĉu mi povas vidi la menuon? | Puis-je voir le menu? (pŭiĵ vŭAr lemenU) |
| Kiom kostas? Bonvolu montri ĝin. | Quel est le prix? Montrez-le-moi, s'il vous plait. (keleleprI. MontrelemŭA, silvuplE) |
| Konduku min al… | Conduisez-moi à… (kondŭizemŭA a) |
| Parolu malpli rapide | Parlez moins vite (parlE mŭenvIt) |
| [Multan] dankon | Merci [beaucoup] (mersI [bukU]) |


# Fiereca Parado

De la 1-a ĝis la 7-a de aŭgusto okazos la plej granda kunveno pri seksa diverseco en la franclingva mondo: la montreala Fiereco. Dum tiu periodo, prezentiĝos pli ol 200 diversaj eventoj, multaj spektakloj (pluraj eksteraj kaj senpagaj), inkluzive de la famega Parado de la Fiereco: fiertemtl.com. La granda parado okazos dimanĉon, la 7-an de aŭgusto, ekde 13:00. Estos silenta minuto je 14:30. La parado iros de placo Dorchester, inter metrostacioj Bonaventure kaj Peel, ĝis strato Alexandre-de-Sève, apud metrostacio Beaudry. Vi povas simple iri de la kongresejo ĝis la strato René-Lévesque [renE levEk] – iru suben laŭ la strato Sanguinet al la direkto de la rivero. Estas ĉ. 1 min de la kongresejo. Aĉetu ĉielarkan t-ĉemizon de la butiko por esti plene ekipita!



# Pinĉilumu por bone amuziĝi

La retejo edukado.net kune kun LKK en Montrealo relanĉas la paroligan aktivaĵon *Pinĉilumado* kiun edukado.net enkondukis antaŭ 15 jaroj en Jokohamo kaj plurfoje uzis jam en diversaj kongresoj kaj aranĝoj. La celo de la aktivaĵo estas renkontigi kongresanojn kaj kuraĝigi la lingve malpli spertajn je agrablaj babiladoj dum la semajno.




Sed kiel facile kaj klare indiki, kiu bezonas helpon kaj kiu pretas helpi? Uzante simplan objekton oni povas facile kaj rapide komuniki la momenton kiam oni havas tempon kaj emon je novaj renkontiĝoj. Ni elektis vestaĵpinĉilojn: **verdajn por la komencintoj** kaj **ruĝajn por la spertuloj**, ĉar por ties fiksado kaj malfiksado (kutime sur la vestaĵojn, sed eblos vidi alilokajn uzojn) oni bezonas nur sekundojn. (Kelkaj fabrikas por si mem kameleonajn pinĉilojn, kunmetante unu verdan kaj unu ruĝan parton, ĉar per tiuj ili havas pretekston alparoli ajnan personon kun ruĝa aŭ verda pinĉilo. Atentu, la celo kelkfoje povas esti pli ol lingvoekzercado!)



Pluraj komencintoj raportis, ke uzante la pinĉilojn ili ekhavis multajn interesajn renkontiĝojn, kaj ne bezonis timi, ke ili ĝenas iun per sia alparolado. Gravaj reguloj estas, ke oni ne forgesu forpreni la ilojn, kiam oni estas okupata, nedisponebla (ekz. dum prelegoj).

Pinĉilojn eblas libere preni ĉe la akceptejo aŭ dum la Movada Foiro ĉe la stando de edukado.net.

*Kongresa Sciulo* estas la kongresa kuriero de la 107-a Universala Kongreso de Esperanto, en Montrealo, Kebekio, Kanado, de la 6-a ĝis la 13-a de aŭgusto de 2022. Redaktas Sylvain Auclair. Redaktejo: ĉambro Milojević, Université du Québec à Montréal, DS-R340. Nova numero aperas ĉiumatene (krom en merkredo). Eblas elŝuti koloran version per apo trovebla je uk2022.glideapp.io. Kontribuojn (tekstojn kaj fotojn) sendu al jrsylvain.auclair (ĉe) gmail.com.


© Universala Esperanto-Asocio, 2022.

Dépots légaux: Bibliothèque nationale du Québec et Bibliothèque nationale du Canada, troisième trimestre, 2022.

# Teritoria agnosko de la 107-a Universala Kongreso de Esperanto en Montrealo, Kanado

Karaj kongresanoj, estimataj honoraj gastoj,

Ni kunvenas hodiaŭ sur indiĝena tero, kiun neniam forcedis la diversaj indiĝenaj nacioj kiuj jam de antikvaj tempoj vivas, vojaĝas, renkontiĝas kaj intertraktas en ĉi tiu regiono, apud la riverego kiu fluas de la Grandaj Lagoj al la Atlantika Maro.



La Granda Paco de Montrealo, 1701-08-04

La Solena Inaŭguro de nia kongreso okazas ĝuste 321 jarojn post la fino de grandega pac-konferenco inter la francaj koloniistoj kaj la indiĝenaj nacioj de tiu tuta regiono. 1300 reprezentantoj de 39 indiĝenaj nacioj venis al Montrealo por la finaj diskutoj kaj la solena subskribo de la traktato, konata kiel la Granda Paco de Montrealo, la 4-an de aŭgusto 1701. Tiu evento restas unika en la historio de la amerika kontinento pro sia amplekso kaj la fakto, kie ĉio disvolviĝis laŭ indiĝenaj konceptoj de interpaciĝo.



La flago de konfederacio Hodinoŝoni

Kiel gastoj en ĉi tiu loko, ni agnoskas kaj profunde dankas la multflankan agadon de la indiĝenaj nacioj por vivi harmonie sur ĉi tiuj teroj kaj akvoj, kaj la privilegion kunveni ĉi tie sur ilia necedita teritorio. Kiel esperantistoj, ni ankaŭ rekonas la paralelecon de nia agado por paco kaj amikeco inter la nacioj kaj la ekzemplo de la Granda Paco de Montrealo, kiu tiel perfekte ilustras la sopiron al paca kunvivado komunan al ĉiuj kulturoj kaj popoloj. Ni ĝojas pro la ŝanco lerni de niaj indiĝenaj gastigantoj, plej notinde la nacio ganjenka (Kanien'kehá:ka) kaj la konfederacio Hodinoŝoni (Haudenosaunee), kaj esprimas nian solidarecon kun iliaj daŭrantaj streboj por paco, justeco kaj interkompreniĝo.

**Mark Fettes**

## Amuziĝu merkrede !

Se vi ne mendis ekskurson merkrede, restas kelkaj biletoj por iri kun la gejunuloj al *La Ronde*. Temas pri vasta amuza parko en insulo en la riverego, kun 38 diversaj karuseloj. Estu vi preta vivi fortajn emociojn.

Ni akiris tre favorprezajn biletojn je 30 CAD anstataŭ le regula prezo por plenkreskulo, t.e. 43,68 CAD. Iru al la kongresa **informejo** por aĉeti la lastajn biletojn. Ekiro estos merkrede je la 9:00 fronte de la kongresejo (renkontiĝo je 8:45). Vi povos amuziĝi dum plena tago. Estas multaj restoracioj surloke. Ne eblas kunporti manĝon.

/LKK

## Kongresa apo: mapoj kaj pli!

Uzu la kongresan apon uk2022.glideapp.io ne nur por vidi la programon plej freŝdatanm, sed ankaŭ por marki la ŝatatajn programerojn tiel ke vi pli facile organizu vian tagon. Notu ke vi ankaŭ povas uzi la apon por babili kun aliaj kongresanoj kaj vidi ĉiujn kongresajn mapojn (la kongresejo, la teatro, la hotelo Hyatt ktp.).

**Ĝustigo!** Notu ke en la Kongresa Libro estis erareto pri la loko de hotelo Hyatt. La gusta strato estas la strato **Saint-Hubert** (t.e. **ne** la tuj apuda strato Berri).

## Elŝutu *La Sciulon*

Dank'al la kongresa apo, trovebla je uk2022.glideapp.io, vi povos elŝuti ĉiujn numerojn de *La Sciulo,* vi povos legi ĝin **kolore** jam antaŭ via matenmanĝo kaj la LKK povos ŝpari paperon!

# Interreto

La kongresejo donas senpagan aliron al interreto al ĉiuj kongresanoj inter 4-a kaj 13-a de aŭgusto. Sendu la vorton *Esperanto* per SMS al 1-833-338-7626 por ricevi la kodon.

Se tio ne ebas aŭ ne funkcias, vi povas peti kodon al la Informejo. Krome universitata teknikisto estos havebla hodiaŭ kaj dum la venonta semajno.

La kafejo Ginkgo ankaŭ disponeblas senpaga wifi-o.

La urbo Montrealo ankaŭ havas plurajn lokojn de senpaga interreta aliro. Vidu la mapon ĉi tie: https://ville.montreal.qc.ca/cartemtlwifi/


# Bistro Ginkgo

Se vi ne havos multan tempon por manĝi dum la UK, sciu ke la *Bistro Ginkgo,* kiu troviĝas rekte en la kongresejo, malfermos kontoron kun pretaj manĝoj. Vi povos rapide aĉeti kaj iri manĝi je la 2-a etaĝo de la restoracieto. La supra etaĝo estos malfermita nur por kongresanoj. Vi povos ankaŭ forporti la manĝon. Estas pluraj mikro-ondaj fornoj en la koridoroj de la kongresejo. Krome vendmaŝinoj ofertas trinkaĵojn kaj manĝetojn. Iru al subtera etaĝo por pli da elektoj. Menuo en la franca: ginkgocafebar.ca La traduko de la menuo en Esperanto: mallonge.net/menuo2022. Liston de aliaj proksimaj restoracioj publikiĝos morgaŭ.

\LKK

# Kontribuu al *Kongresa Sciulo*

Sendu artikolojn aŭ fotojn ĝis 18:00 al jrsylvain.auclair (ĉe) gmail.com.



**Averto pri varmo!**

**Hodiaŭ:** 32°, parte suna

**Vespere:** 26°, sennuba

**Nokte:** 24°, sennuba

**Morgaŭ matene:** 31˚, iom da nuboj.

# Memoraĵoj pri la UK-2022

Ni preparis por vi multajn belegajn memoraĵojn, por forporti hejmen kiel donaco al vi mem aŭ al aliaj. Inter la memoraĵoj estas specialaj eldonoj de poŝtkarto kaj poŝtmarko – eldono de 2022 kaj ankaŭ speciala ĉielarka eldono de 2020: jen unika okazo havi eĉ la poŝtkarton pri la kongreso, kiu ne okazis! Notu, ke la ĉielarkon kaj la vortojn *Ĉio iros bone* mane desegnis la sekretario de la Montreala UK, Ĵenja Amis.

Krome, vi trovos acerajn bombonojn, plej diversajn t-ĉemizojn, glumarkojn, alkudraĵojn (ekz. por dorsosakoj), kolŝnuroj por nomŝildoj, pluvombrelojn kaj sunombrelojn, Esperanto-flagon, pinglojn kun la logotipo de la kongreso, kaj pli!

# Volontuloj dum la UK

Ni plu invitas vin volontuli dum la UK. Necesas pliaj volontuloj por deĵori ĉe Libroservo. Bonvolu veni al la la kongresa informejo por aldoni vian nomon. Aparte sabaton la 13-an, ni bezonos vin por malmunti ĉion. Eĉ duhora helpo estos granda helpo. Ni dankas vin anticipe.

\LKK

# Senpaga metroado

Dum semajnfino, eniro en la metroan reton el kelkaj el urbocentraj metrostacioj (inkluzive de la plej proksima al la kongresejo: Berri-UQAM) estas **tute senpaga**. Do, profitu de tiu ĉi bela okazo uzi la metroon en plena libero! La koncernaj stacioj estas Saint-Laurent, Place-des-Arts, McGill, Peel, Champ-de-Mars, Place-d'Armes kaj Berri-UQAM. Atentu, ke vi devos pagi se vi, dum la rea vojaĝo, eniros per alia stacio. Atentu ankaŭ, ke neniu aŭtobuso estas senpaga (kutime, oni pagas unufoje por tuta vojaĝo, eĉ se ĝi bezonas la uzon de pluraj busoj, kun aŭ sen uzo de metroo).

# Hodiaŭ

**Ekskurso**: Malnova Montrealo: renkontiĝo en la korto *Harmon,* 13:15

Akcepto de **unuafojaj kongresanoj**, salono *Saint-Martin,* 15:00

**Movada Foiro,** en salono Durette (Agora), 19:00 - 21:00